

## & Jen sorto mizera:

< Ripete 14 sed rekante 7 el 31 batoj por strofo, entute 374 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Mangada Rosenörn (Versaĵaro, Madrid 1922). Baladigis Martin Strid (2017) per sveda melodio el Finnlando (NK #4738) kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:31> (a;Mi /La LaTi do Ti;La Ti TiSi Mi Mi;Mi La LaTi do Ti;La mi mimi mi mi

(#Ripete:; i;do dodo mi redo Ti Timi Mi Mi)

(#Rekantaĵe:; La3La LaTi do3do TiLa Si La)

)×12 )+

### (&Strofoj:

'1 Nubaro kolera ; Ja naskas la fulmon  
(.; Hakantan la ulmon ; Per forto  
mistera.)

(.;; Hakantan la ulmon ; Per forto  
mistera.)

(×: **Kreskas ek lilioj dum printempo.**)

'2 La fulmoj de l' nuboj ; Bruligas  
arbaron, ; Renversas remparon ; Ĝi  
restas - nur ruboj! - .....

'3 La fulmo, en maron, ; Montriĝas  
kruela, ; Al ŝipo la vela ; Forigas  
mastaron. ....

'4 Kaj la uragano ; Timige ekblovas, ;  
La ŝipon ĝi ŝovas ; Tra la Oceano. ....

'5 De l' vento la forto ; fariĝas sovaĝa...  
; Maristo kuraĝa... ; Ve! Kia la sorto?!  
.....

'6 Ventega la bleko, ; De l' tondro la  
bruo, ; De l' masto la skuo ; Kaj krak'  
de l' ferdeko. ....

'7 Rulante la ondoj, ; Kun ŝaŭma la  
krono, ; Ĉirkaŭen timono ; Formiĝas je  
rondoj: .....

'8 Multope rulante ; La ŝipon atakas, ;  
Ĉi tiu jam krakas ; Angore ĝemante; .....

'9 Kaj ŝipon senĉese ; Post unu aliaj ;  
Frenez' ambiciaj ; Mortfrapas karese.  
.....

'10 Krakegoj la finaj ; Terure ve! sonas;  
La ŝipon jam kronas ; La ondoj  
obstinaj; .....

'11 Ĉi tiuj fieraj ; La ŝipon englutas, ;  
Restaĵojn alŝutas ; Al altoj eteraj. ....

'12 La maro kolera ; Detruis la ŝipon... ;  
Ve, vidu nur ŝtipojn!... ; Jen sorto  
mizera! .....